

Ĉineske

(16)

e-Librigita de Elerno

junio 2013

Busuanzi (Aŭguristo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de
55,75 silaboj kun duona rimo.

Lily

Hazarda kuniĝo

I.

**hazarde ĉe roj’
bruna forta vir’
baris al mi la vojon
kun flata admir’**

**li mian jupon
prenis per man-tir’
kaj vokis mian nomon
jen je mia mir’**

II.

**li ŝajnis amik’
svage en memor’
sed aspektis avide
je ina favor’**

**mi laŭte kriis
en komenca hor’
kaj trankvile obeis**

pro lia fervor'

III.

**bruske brakumis
li min senvorte
enkore mi suspiris
aj, malbonsorte!**

**tuj liaj Brust' min
tuŝis komforte
kaj lia erekta kac'
tiklas min forte**

IV.

**miajn mamojn li
knedis karese
kisis miajn orelojn
ade senĉese**

**liaj lipoj ja
frotis imprese
sur miaj vangoj varmaj
kaj tre sukcese**

V.

**jen mi kolapsis
kun disfala sent'
mi lin kaptis je korpo**

kun kora konsent'

**la sango bolis
sub virseksa tent'
deziro al amoro
jame en ferment'**

VI.

**li kuŝigis min
nudigis min jen
sur la herba tapiŝ' ni
tordiĝis sen ĝen'**

**mi ĝoje ĝemis
sub lia kis-ĉen'
de mampint' ĝis intergamb'
per langa promen'**

VII.

**mi tordis korpon
sub lia lang-lud'
mi sentis la moviĝon
de l' kap'de testud'**

**ĝi tre rigidis
per forta altrud'
ĝi serĉis mian truon
per enŝova krud'**

VIII.

fontis mia suk'
per glita fluo
ĝi jam alproksimiĝis
al mia truo

mi jam ekstazis
kun korpa skuo
petis ĝian eniron
por gea ĝuo

IX.

fine ĝi glate
en min jam glitis
la birdo profundiĝis
min tre ekscitis

ĝi fojrefoje
piste vizitis
mian kaŝejon ĝoje
eĉ ne hezitis

X.

mi laŭte ĝemis
ĉe la lud-kulmin'
li ejakulis forte
en mia vagin'

tre elĉerpite
ni kuŝiĝis nin
ankoraŭ anhelante
en stulta fascin’

Sero

Akvofalo

Kurten’ arĝenta
pendas ĉe la val’
en sunlumo radias
blindige per pal’.

Aŭdiĝas bruo
jen de jovial’.
Ne homa voĉo sonas
sed akvo en fal’.

Caisangzi

(Moruskolektanta Knabino)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de
74,4,7 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa, a,a. (x=senrima)

Yanke

Tajfuno alvenas

**Jen tajfuno alvenas
kun granda fort'
trans la marbord'
pelas ĉion al malord'.**

**Uragano kaj hulo
kun svinga tord'
kvazaŭ en hord'
puŝas al mizera sort'.**

Chaozhongcuo

(Pedanta Klerulo)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj
respektive de 7,5,66 / 444,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,,a,xa
/ xxa,xa (x=senrima).

Vejdo

Aŭtuna kanto (Ciklo)

I. Aŭtunaj folioj

**ili tremas ŝpin-torde
ŝvebas senorde
supren aŭ malsupren
faladas malforte**

ĉie flave

**ĉie kalve
jen enkorte
jen surstrate ili
ekkuŝas laŭsorte**

II. Aŭtuna vento

**ĝi balaas susure
bruske plezure
ĉion en la mondo
senkompate dure**

**iom fride
iom pike
ĝi ja nure
ŝajne volas blovi
for putraĵojn pure**

III. Aŭtuna pluvo

**tamburas pluvtorento
sur la tegmento
alportas malvarmon
al fervora sento**

**pluva akvo
ŝvabras forte
kun kontento
ĉion en naturo
en ĉiu momento**

IV. Aŭtuna pejzaĝo

**prezentiĝas pejzaĝo
jen en vilaĝo
nuanca de ĉarmo
flava de miraĝo**

**ĝuste kiel
homa vivo
ĉe mezaĝo
l' ekscita panoram'
'as bela omaĝo**

Yanke

La falanta folio

**La falanta folio
per venta strio
drivadas sencele
kun rezignacio.**

**Ĉu al valo
aŭ al rojo
ĝi sen scio
migras kun susuro
kvazaŭ en ebrio.**

Daolianzi

(Kanto de Lavantino)

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ rimarangô xa, a, xa (x=senrima)

Veĵdo

Mem

**Irante
en haven'
vin mi renkontis sen ĝen'.
“Por viziti parencojn?”
Vi ridis. “Ne. Nur min men.”**

Adaptita el “Stelo” de Zhuang Yue

Dianjiangchun

(Ruĝigitaj Lipoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respektive de 47,4,5 / 45,34,5 silaboj, laŭ rimarangô xa,a,a / xa,xa,a (x=senrima)

Niuniu

Revidiĝo post longa tempo

**Ĉe l' printemp-fest'
kun gefratoj kunas mi
pro nostalgi'
kaj sopir-seri'.**

**Granda ĝojo
muzika ari'
glas' en man'
vinluda kri'
ĝis plena ebri'.**

Dielianhua

(Papilio Super Floroj)

ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de
7,45,7,7 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,a,a (x=senrima)

Mandio

Dorna rozo

**en vento la dorna roz'
skuas kapon
triste kun nervoz'
jen sola en ĉi okaz'
kun enkora furioz'**

neniu kun kurioz'

eĉ aliras
al roza korp-poz'
ĉar ĝi ja per pika doz'
minacas kun serioz'

Dingfengbo

(Subigo de Ŝtormo)

Ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 6 versoj
respektive de 7,7;7,2;7;/ 7,2;7,2;7; silaboj, laŭ rimarngô
aabba/ccdeed

Niuniu

Forfuĝado de varmego

ond' de varmega aer'
minacas super la ter'
sufoka, malkompleza
peza
pelas homojn al desper'

fuĝas de arda varmo
svarmo
da homoj la malfortaj
al lokoj friskaj en mont'
al mond'
de verdejoj komfortaj

Fendieer (Papilio)

ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj kun po 8 versoj de 10,34,334,36 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa (x=senrima)

Vejdo

Reveno al la naturo

**Al arbaro ni per busa vetur’
pilgrimas
jen kun plezur’.
Renkontas
nin aer’
freŝa en pur’
kaj vento
kun karesa murmur’.**

**Altaj arbegoj per verda velur’
nin ŝirmas
en ombr-obskur’.
Fore de
urba bru’
beton-kultur’
ni trovas
nin en vera natur’.**

**Antaŭ kelkaj tagoj, ni vizitis Arbaran Parkon
Jiuguoqing kaj ekhavis la senton reveni al la naturo.*

2012-08-14

Fengrusong

(Vento Inter Pinoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj
respektive de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ
rimaranĝo a,a,xxa,xa /a,a,xa,xa (x=senrima)

Veĵdo

Kanto de akvoguto

okaze de Zamenhof-Festo 2011

**jam de sia debuto
en liliputo
nia gento traboras
konstante
kun voĉ-muto
la monton granitan
kiel akvoguto**

**post multe da disputo
nova saluto
el la mondo resonas
adeptoj per konduto
konvinka persistas
ĝis lasta minuto**

Genglouzi (Kanto de Akva

Horloĝo en Nokto)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po ses versoj de
33,6;33,5; / 33,6;33,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xaa,xbb /
xcc,xdd (x=senrima)

Viktoro

Semo de sopiro

**la semo
de sopir'
ĝermas kun vesuspir'
pliiĝas
en la kor'
mordanta dolor'**

**ardiĝas
aspiro
amara deziro
por vidi
vin foje
babili ĝoje**

Guizhixiang

(Aroma Laŭrbranĉo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 4,
54, 64,734,444 / 7,54,64,734,444 silaboj, laŭ rimaranĝo
a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xxa (x=senrima)

Vejdo

Lunlumo en profunda nokto

**La luna bel'
ludas brile sur
nigra ĉiel'.
Sin ŝovas lumfasko
al mia ĉel'.
Jam profundas la nokto
kvietas
la bru-ribel'.
Ankaŭ kalmas
miaj pensoj
ja sen pelmel'.**

**Tranviliga la lunhel'
lulas min milde
per songfabel'.
Vizie aperas
glas' da koktel'**

**kun nuancoj de verdo
sendita
de la anĝel'
por eterna
san' kaj viv' sub
favora stel'.**

Haoshijin

(Proksimiĝas Bona Afero)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de
56,65 / 75,65 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa / xa,xa (x =
senrima)

Guozhu

Malsamaj deziroj

**Ŝi per vestoj sin
beligi aspiras,
por ke rigardoj de
viroj altiras.**

**Sed virinon sen vesto
li pli sopiras.
Al virinoj nudaj
viro admiras.**

Vejdo

Gratulon al Mo Yan*

**Ĝojiga mesaĝ'
alvenas el svedi'
ke vi jam kroniĝas
per Nobel-premi'.**

**Laŭdoj kune kun gloro
alsvarmas al vi
kaj l' honoro ankaŭ
iras al patri'.**

**Por mond-literaturo
jen kun energi'
vi verku zorgeme
bonajn pecojn pli.**

**La elstarajn figurojn
vi kun emoci'
kreu vivsimile
trans la tradici'.**

**Mo Yan estas ĉina fama literatoro, gajninto de Nobel-premio por literaturo 2012.*

Viktoro

Brave, Mo Yan!

**Ĉinstila venko:
kamparo, vilaĝo,
mizerplena viv' kaj
popola saĝo.**

**Temerara kreado:
rura miraĝo
kaj riĉa imago
el cerba kaĝo.**

Heshengchao

(Gratulo al Sankta Dinastio)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj 4 kaj 5 versoj
respektive de 7,5,75 / 44,5,75 silaboj, laŭ rimaranĝo
a,,a,xa / xa,,a,xa (x=senrima)

Guozhu

Pubhara Tuĉ-peniko

(2011-08-06)

**Pubhara tuĉ-peniko ---
Ŝok' al publiko!**

Kiom ŝtat-oficisto/ de respubliko

**koruptiĝis/ en praktiko
al erotiko!**

Degenera pruvo de/ fia apliko.

Heyebei (Lotusfolia Taso)

ĉina fiksfirma poemo el 6 versoj de 6,2;3;7,2;3 silaboj,
laŭ rimaranĝo aab,ccb

Cindy Mckee (Usono)

Nebula vidaĵo

**Apenaŭa strigo,
tigo
kaj fono,
premvolitaj per grizo.
Skizo
en ŝtono.**

Josep V. (Katalunio)

Post briko

**olda magazeno
eno
post briko
hejmeniras lantpaŝe**

**kaŝe
heliko**

Al virino persa

**Irano nigrevesta,
nesta
palaco
de l' nigreco pura:
nura
surfaco**

**religi-furoro
moro,
pri kio
sin okupas ajatol'?
pri tol'
ne Dio!**

**al virino persa
versa
dediĉo:
la nigron -vi formetos
-tretos
feliĉo**

*Post vidi tre kortuŝan trukfoton (ĉe la blogo de Reza) kiu denoncis la religi-registaran sintenon kontraŭ virinoj en Irano, mi faris tiun ĉi poemon. La blogero de Reza titoliĝas "La ne realigitaj sonĝoj".

Lily

Eroto

**eroto la sponta
fonta
de amo
fermentas jen fervore
vore
sen flamo**

Vejdo

Mevo

**per aera levo
mevo
leĝere
flugas post ŝtorm' detrua
brua
ja vere**

Viktoro

Nimfeo

**nimfeo trankvila
brila
de roso
kuŝas sur akvo klara**

**kara
sen floso**

Lavenda kampo

**el maro purpura
pura
odoro
logas abelojn tire
mire
al floro**

Yanke

Herbo

**en ventego trema
ĝema
perpleksas
ĝi, sed vere obstine
pine
ne fleksas**

Jiangchengzi (Riverborda

Urbo)

ĉina fikforma poemo el samaj du strofoj kun po 8 versoj de 7, 3,3,45,733 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,xa,xa (x = senrima)

Sam

Ni memoru tiujn geknabojn en mizero
okaze de Internacia Geknaba Festo

**La geknabojn en mizer’
sen paner’
sen esper’
ni memoru
firme kun sincer’.
Ni devas agi vere
sed ne nur
sur paper’.**

**Niaj kreskas en buter’
en liber’
kun fier’.
Ni al ili
diru per la ver’
ke ekzistas geknaboj
en malsat’
sur globter’.**

Jiangnanchun

(Printempo Sude de Rivero)

ĉina fiksforma poemo el 6 versoj de 33,55,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

Vejdo

Ŝtono ankaŭ disfloras

**Sensente
la ŝtono
kuŝas jam longe
en ĉi sezono
aŭtuna fruktodona
sur flaveta gazono.**

**Jen birdo
super ĝi
flugas pretere
en gaja ari'
faligas senzorgeme
semon pro la kanta kri'.**

**La semo
sencele
sin ŝovas trafe
aŭ iras ŝtele**

**en la ŝtonan fendeton
por reviviĝi ele.**

**Verŝajne
ŝtona kor'
ekplenas de am'
per zorga favor'
protektas ĝin en la sin'
vartadas ĝin kun fervor'.**

**Forpasas
aŭtuno
sekvas la vintro.
Venas en nuno
la printempo sunplena
kun viviga fortune.**

**Vekiĝas
la semo
skuas talion
kun ĝoja ĝemo
etendas sin senĝene
el la ŝtona dilemo.**

**La floro
en sunlum'
ridas fiere
en ŝtona brakum'**

**jam invitas abelojn
alflugi kun dolĉa zum'.**

**Ĉu fridas
la ŝtono?
Ho ne, neniam.
Kiel patrono
ĝi servas ĉiutempe,
se okazas bezono.**

Jianzi Mulanhua

(Mallongigita Melodio

Magnolia)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 4,7; 4,7 silaboj kun para rimo.

Mandio

Vivi kiel lotusfloro

**Kiel lotusflor'
oni devas en ag-mor'
vivi pure,
konduiti bon-figure**

**kaj bonvirte,
dece agi malflirte,
por vantgloro
ne ĉasi kun adoro.**

Kuxiangsi

(Profunda Sapiro)

ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj kun po 8 versoj de 7,33,8,33,33 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,xa,xxa (x = senrima)

Niuniu

Mia konfeso

okaze de ŝia naskiĝtago 2013

**Dum jaroj mi kun obstin'
sopiri
emas ŝin.
Mi kisas ŝin en halucin'
brakumas
al la sin'.
Sed mavas
la destin'.**

**Ŝi je mia korinklin'
ne kredas,**

ve, l' virin'!
Ĉu ŝi estas frida maŝin'?'
Amata
per domin'
ŝi jame
regas min.

Langtaosha

(Ondo Lavas Sablojn)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de
5,4,7,74 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,xa (x=senrima)

Eto

Pluvego en Pekino

Inund' el ĉiel'
jen kun kruel'
invadas tigre iel
dronas tutan Pekinon
per akva ŝvel'.

Homoj en pelmel'
pro akva pel',
aŭtoj mergiĝas kun ŝel'.
L' urbo skuas ŝancele
sen ajna bel'.

2012.7.23.

Litingyan

(Hirundo ĉe Kiosko)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 6 versoj de 66,
76, 56 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

Vejdo

Serĉi spadon

ĉina fablo

**Dum boat-vojaĝo,
homo pro malatent'
faligis sian spadon
akven ekster atend',
tuj sur boatvand'
faris markon sen pent'.**

**La boato haltis
ĉe alborda moment'.
Li saltis en riveron
por serĉi sen prudent'.
La fino certis:
li ploris kun lament'.**

Linjiangxian (Feo ĉe Rivero)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de
66,7,55 laŭ rimaranĝo xa,a,xa (x=senrima)

Sero

Morna fiŝo

**fiŝo sentas mornon
jam ne plu en river’
estas manĝaĵa prosper’
nek oksigeno
eĉ nek efemer’**

**poluita akvo
kvazaŭ el la infer’
rabis ĉion kun sever’
neeblas vivi—
vivi kun esper’**

Manjianghong

(Rivero Plenruĝa)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de
434,344,77,353 / 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ
rimaranĝo xxa,xxa,xa,xxa / xa,xa,xa,xa,xxa (x =
senrima)

Eĉino

Pluvego en Pekino

(2012-07-21)

**Animskue/ pluvego/ en julio
inundas/ en Pekino./ Sensacio.
Vidiĝas ĉie ondoj/ sur stratoj averio.
Sin helpas/ popolanoj sen/ vekrio.**

**Mankas al/ socio
sed ŝtata/ konscio.
Ne nur kloaka/ arterio.
Mamonisma konduto,/ drasta anomalia.
Post plago/ ĉu pli multe da/ racio?**

Vejdo

Al foraj amikoj

omaĝe al 30-jariĝo de GEA

**por nia cel'
amikoj
en la foro
vi faris
jam multege
da laboro
dum plenaj tridek jaroj
marŝas kiel motoro**

**antaŭen
senlace kaj sen
langvoro**

**jen viaj
fervoro
obstino
esploro
spronas nin plue
ja en ĥoro
konstrui verdan rondon
kun persistema koro
cele al
egala mondo
en gloro**

Mantingfang (Aromo Plenas en Korto)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj
respektive de 446,45,634,345/ 2,344,54,634,345 silaboj,
kun rimaranĝo de xxa,xa,xxa,xxa/ a,xxa,xa,xxa,xxa
(x=senrima).

Veĵdo

Navigado en spaco

Gratulon al sukcesa pafado de Shenzhou-10

spacoŝipo

Sur dezerto

spacoŝipo

rekte leviĝas sor

en aeron.

Kun forta motor’

ĝi navigas cele

al orbit’

en fiksa hor’.

Ĝi flugas

destinite

por spac-esplor’.

Kun kor’

sindona

astronaŭtoj

per mallangvor’

plenumas taskojn

en spaco for.

Jen por la homaro

kaj patruj’

ili per fort’

kuniga

certe agas

en sukcesa glor’.

Nangezi (Suda Kanto)

ĉina fiksforma poemo el 4 versoj de 55,7,9 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)

Yanke

Kiam vi forestis

**Pro via forest’
veante plore
mi jam fartis langvore
studis, laboris malfervore.**

**Pro via forest’
mi pripensis nur
la tagnoktojn kun plezur’
kune kun vi en ama murmur’.**

**Pro via forest’
mia appetit’
perdiĝis, mia vizit’
al kinej’ foriĝis je subit’.**

**Pro via forest’
mi kvazaŭ en mort’
pasigis tagojn sen fort’
malgraŭ endoma varma komfort’.**

**Mi ne povis min
savi el dilem'.
Sufiĉas via kompren',
via ĉionfanda ĉirkaŭpren'**

Niannujiao

(Ĉarma Kantistino)

ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de
436, 436,445,46 / 654,436,454,46 silaboj, laŭ rimarangô
xxa, xxa,xxa,xa (x = senrima)

Guozhu

Novjara Bildkarto

**Scivoleme/ atendas/ mi en fru-mateno
kun konjekto:/ De kie/ okazos alveno
de l' unua/ ret-poŝtaĵo/ kun nova beno?
El Usono/ venas al mi jeno:**

**Bildkarto de Cindy, /nin ridiga per
/humur-pleno:**

**Hundo sidas/ ĉe osto/ kvazaŭ ĉe festeno.
mi rapide/ elfaras tekston/ kun refreno
kaj ĉineskas/ laŭ mia kompreno.**

Vejdo

En flora maro

**kolza kampo
ondadas
sub sunlumo ora
en aero
plenplenas
aromo la flora
zum' abela
orelplaças
en vent' favora
mi ebrias
ĝis la fundo kora**

**ĉu l' natur' precipe
ja dorlotas nin
per valora
belartaĵo
aŭ l' tero
per fekund' fervora
naskas tian
buntecon veran?
al kolora
mond' mi kultas
kun sento adora**

Pusaman

(Budhista Dancisto)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de
7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo

Vejdo

Novjara preĝo

**longe daŭras milito
kun paca hipokrito
de Afganio
nun ĝis Sirio**

**suferis homoj
brulfalis domoj
ĉu tiu plago
ĉesu sen gago?**

**suferojn travivis jam
ni de tertremo, cunam'
erupta vulkan'
kaj ŝtorm-uragan'**

**okazis morto
fuŝa malordo
ĉu alvenu pac'**

sur ĉi tera spac’?

**homojn falĉas la malsat’
beboj krias kiel rat’
senhelpas viroj
zumas suspiroj**

**kia trista scen’
nesavebla ĝen’
ĉu bonos veter’
frukt-donos la ter’?**

**ĉie epidemio
frenezas kun manio
vere senbride
murdas inside**

**kvazaŭ insekte
rodas difekte
ĉu estu l’ ide’
pri la panace’?**

Qinyuanchun (Printempo en la Ĝardeno Qin)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 13 versoj de
444,5444,447,354 / 6,35,5444,447,354 silaboj laŭ
rimaranĝo xxa,xxxa,xxa,xxa / a,xa,xxxxa,xxa,xxa (x =
senrima)

Guozhu

Nebulozo

**Nun rigardu
al Pekino
nebulplena.
Tro ofte dronas
la ĉefurbo
de Ĉinio
en venena
nebulozo,
kiu kovras
ĉion polvokurtena.
Birdnesto
Siluetiĝas
bild' ĉagrena.**

**En angul' ĝardena
Gimnastas**

en hor' matena
tamen ankoraŭ
mort-spitantoj
en aero
abomena.
Belulinoj
konkure sin
ŝirmas per masko ĝena.
Retanoj
versas pastiĉon
nur malbena.

Josep V. (Katalunio)

DERMATOZO

haŭto skvama
mensa ŝildo
korpa fazo.
dek-unu jara
sub la harar'
rondoj etaj
sen emfazo.
jar' dudeka
amasatak'
malfacilas la razo
flavecaj
fariĝas ungoj
militkazo!

**pomado kaj gazo
tinkuro
tutplena vazo.
ŝajne jen sana!
longas vivo
venos nova
la okazo.
nova agres':
fingrartrito
ruĝaj ventro kaj nazo,
ada juk'
tortur' ĉiama
psoriazo**

Vejo

Saluton al panjo

okaze de Patrino Tago 2012

**l' amo daŭras
de naskiĝo
ĝis vivofin'
ĝi elfluas de
bonfavora
altruisma
patrina sin'
zorgema fleg'
anĝela sent'**

**de la grandanima in'
tenere
tre delikate
envolas min**

**amon de la patrin'
mi vere
sentas kun inklin'
al gravuriĝo
en la koro
ŝi persistis
jen kun obstin'
min protekti
min subteni
per viviga vitamin'
dankon, panj'!
mi vin salutas
kun kapo-klin'**

Viktoro

Sopire al hejmltero

**mi restadas
multajn jarojn
kun korsufer'
en alia land'
ĉiu-hore
mi sopiras**

**al la hejmtter’
en mia songĝ’
filmas bildoj
karaj riĉaj en aper’
kun alvok’
al ĝia sino
de ama sfer’**

**la impona river’
fluadas
kun granda tener’
en mia koro
ĉe ĝi sidas
la gepatroj
de kor-sincer’
kaj rizkampoj
ondumantaj
en orkolora prosper’
oh, ĉio
kare viva en
freŝa aer’**

Shaonianyou

(Vojaĝo en Juneco)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de
7,5,445 /75,445 silaboj, laŭ rimarango a,a,xxa / xa,xxa
(x= senrima)

Vejdo

Maja kaprico

**Subite vipas pluvpel'
sub sunluma hel'
la pavimon
la pasantojn
sen preta ombrel'.**

**Ili forfuĝas ĉien
jen sen ajna cel'
de pluva ban'
de akva frap'
de vipa kruel'.**

**Abrupte ĉesis pluv' nun,
elvenas la sun'.
Kun vaporo
en aero
ĝi bakas per pun'.**

**Volvataj de varmego
sed en briza zum'
homoj sentas
sin komfortaj
en friska brakum'.**

Shengshengman

(Lanta Sontreniĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 10 versoj
respektive de 4,46,64,634,336 / 6,36,46,634,37 silaboj,
laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xa (x =
senrima)

Cindy Mckee (Usono)

Sekuro estas komuniko

**Nia sekur'
kostas multon.
Nia nuna tortur'
estas enŝlosiĝo
malantaŭ mur'.
Mi ne kaŭros tie
viŝante
je posta spur'.
Ni pelu**

**teruron
for de ĉiu kultur'.**

**Estu nia futur'
ke mildo
iĝas nia natur'
kaj frateco
moro tute matur'.
La forpelo eble
ekzistas
en la murmur'
amika,
nia komuniko nur!**

Lily

Flava rozo

**kun morna kor'
flavan rozon
je Valentena hor'
mi al vi prezentas
en trista plor'
vian foriron mi
ne volas
sed per ignor'
okula
vi celas
al alia sinjor'**

**jen en flava rozflor’
vizie
nia dolĉa amor’
voluptema
mia mania bor’
vivece aperas
bedaŭre
nun kun rankor’
adiaŭ
mi diru al vi en for’**

Vejdo

Amatino en la koro

okaze de Valentena Tago 2012

**en mia kor’
vi amatin’
min amas kun fervor’
sincere dum jaroj
sed sen amor’
sen intimaj tuŝoj
ni kveras
en ĉiu hor’
vi ĉarma
kreitaĵ’
jen de Dia favor’**

**kun ardanta ador’
mi flegas
vin nure en memor’
vin sekrete
kaŝas, mia trezor’
ja en mian sinon
eterne
vi freŝa flor’
tenu vin
plezura en bonhumor’**

Por nia sekureco

Funebre pri la viktimoj en bombadoj en Bostono

**Krioj kaj plor’
super Boston’
vibradis en horor’.
Jen eksplodis bomboj,
griza kolor’
de fumo
alt-pendis.
Fatala hor’
tragika
profunde
skribiĝis en memor’.**

**Multaj kun bona kor’
mortfalis
en la dram’ de dolor’.**

**La tragedi'
vundis per larĝa vor'
multajn senkulpulojn.
Ve, damne!
Ni ja en ĥor'
elpelu
fiajn teroristojn for!**

17-04-2013

Shiliuziling

(Dekses-Silabo)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj,
laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

Benjamenon Kraŭs (Usono)

Malhavo

**vin'
kun la patro kaj patrin'
nesamas
sen mia avin'**

**ŝi
kiel hela galaksi'
lumadas
en mia konsci'**

stel'
forĝata per belanĝel'
ĵus falis
el nokta ĉiel'

Cindy Mckee (Usono)

Printempo ebriigas ĝardeniston

plant'
mi konfuzas vin kun kant'
kvin sentoj-
unu, en diant'

plant'
vi junas, sed diamant'
kompare
estas diletant'

plant'
arbo estas elefant'
pli plaĉas
via dolĉa kvant'

Eto

Damninda pluvo

bru'
tiktaka sur domkonstru'
senĉese
daŭras kun enu'

gut'
pluva traboras en mut'
tegmenton
laŭ kolona krut'

kot'
algluiĝas al la bot'
knarknare
sub mia paŝtrot'

ek
al rendevu' kun malsek'
trakorpe
mi veas sen blek'

fi
vi damninda pluva di'
detruas
planon de pasi'

jam
mia kor' en arda am'
humidas

pro mortanta flam'

Josep V. (Katalunio)

Verso kaj homo

al
poezia artbatal'!
treiniĝo
por vivlasta fal'

vort'
paralele aŭ en ort'
celtrafa
aŭ misa agord'

skurĝ'-
bato por maldeca burĝ'
aŭ eble
por amora urĝ'!

ĝu'!
mallaŭtiĝu plene bru'
averta
pri fina vanu'

pens'
laŭ modelo de Kurzens'
tia viv'

poezia senc'

Niuniu

Vintra vento

vent'
mordadas en ĉi moment'
paŝantojn
kiel frid-serpent'

ĝi
ululas de histeri'
tra stratojn
falĉas kun mani'

frid'
alportiĝas en rapid'
pikadon
obsedas sen brid'

dom'
skuiĝas kiel fantom'
knarsone
de blovanta gnom'

jam
formortis ardanta am'
solecas

li jen sen balzam’

**pens’
vagas en venta intens’
vanege
pro rigora sens’**

**al
printempa sentimantal’
sopiras
li kun kora pal’**

Vejdo

Voço de paco

okaze de 70-jariĝo de ĈRI*

**Ĉu
vi ja aŭdas el la blu’
jen voĉon
la klaran sen sku’?**

**Re
kaj re ĝi kun la ide’
de paco
vokas vere tre.**

Il’

**per-radia kun facil’
elsendas
ondojn de babil’.**

**Sen
interrompo kaj kun pen’
ĝi viglas
aktivas sen sven’.**

**El
Pekino kun tona bel’
la voĉo
plaĉas al orel’.**

**Per
radio ĝi kun leĝer’
disflugas
trans mont’ kaj river’.**

**De
la ĉiela apoge’
resonas
kant’ de jubile’.**

**Ek
jam antaŭ jaroj sepdek
fariĝis
ĝi l’ paca Mekk’**

Kor'
ĝia batadas en ĥor'
kun la mond'
por homa honor'.

Jam
ĝi per multalingva gam'
brodkastas
je monda aklam'.

Al
popoloj en monda skal'
ligiĝas
ĝi per son-kanal'.

Ret'
radia pontas en pret'
tutmonde
per sincera kred'.

O!
milit' la paca parol'
pli fortas
ĉe monda popol'.

Jen
nia od' kun bona ben'

**omage
al ĝia solen’.**

*ĈRI: Ĉina Radio Internacia

**La ĉineska poemo estas akrostike verkita. La unua litero de ĉiu strofo ligite formas “ĈRI sepdek jaroj”.

Ek al printempo

**varm’
eta bloviĝas al farm’
verdigas
teron per herb-svarm’**

**el
blanka glacia kruel’
glugle l’ flu’
impetas kun ŝvel’**

**sun’
ĵetas pli varmajn jam nun
radiojn
kun brila fortun’**

**vent’
blovas jam sen pika dent’
karese
per ĝojiga sent’**

ter'
el longa frost' de mizer'
moliĝas
kun vol' de esper'

ĵus
ĝosoj kun krevita buŝ'
junverdas
sub pluveta duŝ'

bru'
ĝoja birda sen enu'
muzikas
por reviva ĝu'

nur
vivoj lante kun plezur'
moviĝas
en bela natur'

mond'
la homa en viva ond'
avidas
je rea renkont'

temp'
plene en aroma tremp'
alvenas

jen ek al printemp'

Bonvenon al Josep V.

vi

Josep jen al poezi'

ĉineska

ekas kun raci'

il'

versa de granda facil'

en mano

magias kun bril'

sent'

via en krea talent'

radias

glime en silent'

ĉu

altas parnasa konstru'?

atingos

ni pene sen bru'

ŝat'

al vortludo, kara frat',

kondukos

al sukcesa stat'

**mir’
ĉe ni pro via inspir’
spronas nin
al nova akir’**

**al
vi bonvenon el kor-val’
ni sendas
kun vina pokal’**

Vejdo

Indignanta birdo

**roj’
fariĝis bruna ĉe l’ voj’
veadas
birdo kun malĝoj’**

**al
malpura glugla kanal’
ĝi flugas
ba! akva skandal’**

**el
la fluo haladzo-pel’
leviĝas
je kropa ribel’**

**kun
soif' akriĝanta nun
ĝi serĉas
por trinka fortun'**

**sur
la tero ĝi kun plezur'
ja trovas
flakon akvan nur**

**en
ĝi restas kiel festen'
du gutoj
nur por beka pren'**

**ĝi
deziras bani sin pli
sed ho ve
ne en ĉi medi'**

**post
trinko kun falanta vost'
reflugas
ĝi je ŝvita kost'**

**por
pli granda akva trezor'
penegas**

ĝi horon post hor’

lac’

ĝin konsumas per minac’

ĝi falas

teren kun grimac’

jen

ĝi koleras en ĉagren’

kun sakroj

pri homoj sen ben’

pro

ilia detruo do

aŭ ĝi ja

petas de l’ hom’ tro?

sen

rimedoj en granda splen’

ĝi kuŝas

preĝante Amen

Viktoro

Nova neĝo

neĝ’

kovras arbojn sur monteĝ’

blankbrile

kiel nobla reĝ'

**el
la ĉielo la mantel'
ĵetiĝis
jen kun flirta bel'**

**per
blanka donac' al la ter'
ornamas
la neĝa leĝer'**

Atendado

**Jam
neĝ' rigide per malvarm'
katenas
min jen sen balzam'.**

**mi
jam ŝlosis min sen konsci'
pri tempo
kun kora anksi'**

**sed
mi atendas sen rimed'
kviete
jen ĝis frosta ced'**

ĉu
printempo tre distas nu
se vintro
paŝas kiel flu'

Yanke

Printempa pluvo

Briz'
karesas milde per kis'
la teron
kaŝitan en griz'.

Stri'
pluva dancas sur foli'
gracie
de blanka lili'.

Tik-
take ekas pluvlirik'
kvazaŭe
sone sub muzik'.

Flu'
pluva lirlas en sinu'
sur grundo
kun ronĝa detru'.

Pli
verdas herboj kun radi'
tagluma
skue en vari'.

Jen
juna paro en promen'
kveradas
en pluvo sen ĝen'.

Sur
lotusfloro restas nur
papili'
malseka sen kur'.

Voj'
akve kotiĝas ĉe roj',
infanoj
surtretas kun ĝoj'.

Blov'
friska en murmura mov'
ŝancelas
arbojn per puŝ-ŝov'.

Bel'
de la natura fabel'
sin montras

en pluva malhel’.

Shuidiaogetou

(Preludo de Akva Melodio)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 9 kaj 10 versoj respektive de 55, 65, 665, 55/333, 47, 665, 55 silaboj laŭ rimaranĝo de xa, xa, xxa, xa / xxa, xa, xxa, xa (x = senrima)

Eto

Persikfloroj pompas

**Kovranta l’ monton
ruĝeta kolor’
impresas tre bele.
Je matena hor’
jam multaj turistoj
paŝas inter arboj
ŝmac-laŭdas en ĥor’
envolvate de
aroma odor’.**

**Abeloj
rondflugas
en labor’
diligente**

**kolektante kun fervor'
polenon de floroj.
Homoj kaj abeloj
en ruĝeta glor'
ja interagas
kun sincera kor'.**

Shuilongyin (Akva Drako)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 12 versoj de
67,444,444,5433 / 6,34,444,444,544 silaboj, laŭ
rimaranĝo xa,xxa,xxa,xxxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x=
senrima)

Eto

Al surreta ŝi

**Nesaveble falas
mi en amon de angor'.
Mi murmuras,
mi deliras
en ĉiu hor'.
Mi ne manĝas
mi nek dormas
kun kordolor'.
Mi diris al ŝi
ke mi kovas
la amon**

en la kor’.

Ŝi snufis per ignor’
dirante
“Aha, sinjor’,
mi neniam
tian senton
en la memor’
de via am’,
sed babilon
de korfavor’!”
Kia inaĉo!
Ho ve, mia
amo, for, for !

Siyuanren

(Sopiro al Fora Homo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvin versoj de
75, 445 / 7,5,545 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo
xa,xxa / a, a, xxa (x=senrima).

Guozhu

Fotoj pri printempa trafiko

Jen fotoj pri printempa
trafiko scena.

**Pasaĝeroj
diverslokaj
en trajn' homplena.**

**Kun celo hejmrevena
tra vojaĝ' ĝena.
Legiĝas laco.
Nin kortuŝas
veo miena.**

2012-01-29

Vejdo

Funebre pri s-ro Laŭlum

**Kvazaŭ tondro nin trafus
la hom' kun talent'
forlasis nin
por eterne
ja ekster atend'.**

**Kun dolora sentiment'
ni pri la event'
grandan bedaŭron
esprimas en
funebra silent'.**

**Li elstaras solide
kiel monument'**

**en E-movad'
de Ĉinio
kun vera aŭtent'.**

**Liaj verv' kaj diligent'
lia kompetent'
por verda afer'
vivas ĉiam
inter nia gent'.**

(10-11-2012)

*Laŭlum estis ĉina elstara tradukisto de Esperanto.

Sumuzhe

(Virina Ĉapo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 7 versoj de 33,
45, 7,45 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a,xa (x= senrima)

Sero

Maldormado

**Lunlumo
arĝente
verŝiĝas. Mi
veas lamente
turniĝadis serpente
pro ĉagreno**

ĝena turmente

**Paseoj
torente
svarmas mensen.
Ĉu preĝi pente
aŭ forgesi sensente?
Forlasu do
indiferente.**

Suzhongqing (Kora Sento)

Ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 6 versoj
respektive de 7,5,65 / 33,3,444 silaboj, laŭ rimarangô
a,,a,xa / xa,a,xxa (x=senrima)

Cindy Mckee (Usono)

Vidi, provi aŭtunon

**Kiam bruna vegetal'
iĝas ruĝpetal'
mi kredas en ŝanĝo
por ĉi animal'.**

**Mi provas
per inhal'
al vital',**

esperante
sendi ruĝon
al mia pal'.

Mandio

Testamento de iu patrino

Testamentis la patrin',
"Ĉe mia vivfin',
mi nun donas al vi
laŭ mia destin'

nenion
krom inklin'
hardi vin
per honesto
dum vivrutin'."

Vejdo

Aŭtuna karnaval'

en aŭtuna karnaval'
ne kolor' de pal'
regas ruĝa gamo
tra farb-festival'

de bruno
en la val'

ĝis vual'
ruĝa sur mont'
jen mirplene
buntas ĝangal'

Tasuoxing (Paŝo sur Herbo)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de
44,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa,a,xa (x=senrima)

Lily

Rendevuo sub persikarbo

sub persikarb'
la rendevu'
kunligas nin per seks-ĝu'
ni kveras, smaĉe kisas
dronas en pasia sku'

li kaptas min
je la genu'
eniras min tra la tru'
mi ĝemkrias senĉese
orgasm' jam venkas nin du

Tianxianzi (Fea Kanto)

ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 7,7,73,3,7 silaboj,
laŭ rimarangô a,a,xa,a,a (x=senrima)

Zhuang Qixiong

Kosmonaŭtoj

**Per feliĉa karavel'
rekte flugas al Ĉiel'
kosmonaŭtoj en Ĉini'
kun fidel'
de anĝel'
kaj mondpaco de model'.**

**Por estonta nubkastel'
ili laboros sur rel'
diligente kaj pene.
Kia bel'
kaj miel'
kun eterne glora cel'!**

2012-6-16

Tiaoxiaoling (Flirta Kanto)

ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.

Cindy Mckee (Usono)

Pri neĝo en junio

**Devo, devo
ĝis ĉi libra levo!
La sklavigo cerba
lasis min acerba.
Bare, bare,
mi kaĝiĝis jare.**

Debuto de la malbelulino de la vilaĝo

**Bela, bela?
Nur en tag' malhela!
Mortis ĉiu ulo
per ŝia okulo
Loku! Loku!
Virojn ni pli stoku!**

Eto

Sorto

**sorto, sorto
decidas per forto
altrudas per premo
eĉ morta dilemo
mole, mole
oni cedas vole**

Guozhu

Neĝo en Junio

**Ŝoko, ŝoko ---
junia neĝfloko!
Ŝvebas de aere
ŝirlibroj al-tere.
Rete, rete,
vidiĝas impete.**

** Noto: okazis en multaj lokoj tra Ĉinio la eventoj ke post la enira ekzameno de universitatoj, ekzamenitaj lernantoj disŝiris siajn lernolibrojn en pecetojn kaj disjetis ilin de superaj etaĝoj, tiel aperas la mirinda spektaklo de neĝado en junio.*

Josep V. (Katalunio)

Amuziĝo

**finfin'! finfin'!
tiauxjaolin'
vekigis la emon
tuj verki poemon
nome, nome
ridi kor-endome**

**(Mone, mone?
Tute ne! Sindone!)**

Lily

Frigida virino

**flamo, flamo
ardas voluptamo
jam erektas koko
dura kiel roko
koro, koro
preta por amoro**

**suko, suko
mankas sen seks-juko
sentsenta vagino
frigida ino, ve**

**veno, veno
por geiĝa ĝeno**

Niuniu

Denove Obama

**ĝoje, ĝoje
venkas alifoj
Obama batale
por regi plenpove
manovri denove
veno, veno
al nova ĉagreno**

**pene, pene
li cerbumos splene
kion fari saĝe
sin savi domaĝe
ĝema, ĝema
pro stato dilema**

Vejdo

Novjaran saluton

**Beno, beno,
bonfartu sen ĝeno,
penu kun kuraĝo
en nova vojaĝo.**

**Ĝoja, ĝoja
sukceso refoja.**

**Sano, sano,
tenu ĝin en mano.
Vivu sen ĉagreno
ĝis oldeca veno.
Nove, nove,
antaŭen tutpove.**

**Vero, vero,
por nia afero
strebu kun fervoro
agu en verd-gloro.
Rolo, rolo,
persistu kun volo.
(07-02-2013)**

Viktoro

Gitaro

**kordo, kordo
vibras en bonordo
belsone, leĝere
inspirige vere
reve, reve
sono flugas meve**

Wanghaichao

(Rigardo al Martajdo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de
446, 446,5,54,47 / 6,54,446,5,54,47 silaboj, laŭ
rimaranĝo xxa, xxa,a,xa,xa / a,xa,xxa,a,xa,xa (x =
senrima)

Sero

Mi amas la insulon

**Ĉe horizont’
ŝi elstaras
impono sur la mar’
kontraŭ vento
kontraŭ ondoj.
Super ĝi meva ar’
rondflugas sen bar’,
fiŝistaj ŝipoj
sur akva klar’
tange flosas
aŭ haltas ĉe ankra star’.**

**La insulon kun ard’
mi vere amas
pro ŝia kar’
al mia kor’.**

**La terpeco
valoras multe, ĉar
longe sen erar'
ĝi apartenas
tra sankt-deklar'
al la patri'
spite al fremda barbar'.**

18-09-2012

Vejdo

Spektado al neĝa pejzaĝo

**blankaj flokoj
dance flirtas
el nebula ĉiel'
en ventblovo
sub svaga sun'
kun tre rigora gel'
sterniĝas sur ter'
la tuk' arĝenta
brile en hel'
jen ebena
kaj bonorda sen ribel'**

**la montoj en mantel'
en opal-kolor'
kaj kun ĉapel'
pure palas**

travideblas
arboj jen per ombrel'
kun glacia bel'
staras senparola
kaj sen ŝancel'
kia pejzaĝ'
de neĝ-glacia fabel'

Xiaomeihua (Eta Umefloro)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 3,3,7;
3,3,9; 7,7;3,3,9 silaboj, laŭ rimaranĝo aaa bbb cc ddd.

Guozhu

Printempa trafiko

Sufere,/ mizere,/ atendadi ekstere,/
kruele,/ sardele,/ tranokti ofte subĉiele,/
kun revo por aĉeto / de vagona bileto/
revena/ matena/ post interpuŝiĝo homplena. /
Problemo/ kun ĝemo/ fariĝas fokus-temo/
primare/ amare/ sensolva preskaŭ ĉiujare./
Promes' oficiala/ sonas mensog' skandala./
Kunsenta/ lamenta/ ploras mia kor'
sentimenta.

2010-01-13

Yexingchuan

(Nokta Ŝipvojaĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun ses versoj de
7,34,446 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,xxa (x = senrima)

Sero

Noa arkeo nenecesas

**ne venis la lasta tag'
finfine
pensoj en vag'
kvietiĝas
senribele
ĉu decas sava ag'?**

**ne estos fatala plag'
al la mond'
tio 'stas blag'
vekiĝu vi
stultaj homoj
el koŝmara imag'**

Yijianmei

(Branço da Umefloro)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun ses versoj de
7,44,744 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,xxa (x = senrima)

Yanke

Kor' ĉe koro

**ĉiutage kun sopir'
al vi kara
mi forta vir'
volas
kuni kun vi
per intertir'**

**por esti al via spir'
mi brakumu
vin de forŝir'
de soleco kaj tristo
jen kor' ĉe kor'
sen vanta dir'**

Yijiangnan (Sopir-al-Sudo)

ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj
laŭ rimarangô xa,xa,a (x=senrima).

Jadranka Miric (Serbio)

AI PATRUJO

Serba kant'
forto kaŝita.
Miljara historio
eterne prikantita.
Epos' skribita.

Vekrio
en decida hor'.
Ĉu feniksa savo nia
aŭ koto je serba kor''
pro europa aŭror'.

Ruĝa flago
flirtas fiere.
Gloras flag' trikolora.
Lazuras fontoj vere.
Blankas mont-sfere..

Fervora
land' plurnacia,

**laborista ag' povra,
evoluas movad' socia ,
kredo duonpia.**

**Ĉantaĝo!
Popol' malsana,
pro mizero ĉiutaga
pro korupto urbana.
Pro pereo vana!**

Dolĉaj ammemoroj

**Naturkant'.
Suno oriĝas
sur ĉiela arkaĵo.
Lanteme ĝi ruĝiĝas.
Jam vesperiĝas.**

**Eklumis
Lun' aperanta.
Agrabla paca vesper'.
Pro venteto blovanta,
pro vi pasanta.**

**Via vang'
zebre strekita
pro ombreto falinta,
de la floro plukita
al vi donita.**

**Via rid',
kiel venteto.
Tenera animkiso.
La rava hejmbildeto.
Jen mi — poeto.**

**Bluas stel'
alte sur ciel'.
Kosma bonvenon al mi.
Ĉu mi respondu iel?
Venkas lipmiel'.**

Kial oni elektas militon?

**Milito.
Danĝera vorto.
Kunportas malfeliĉon.
Morto en ĉies korto.
Tragika sorto.**

**Metodo
mire varias.
Iam palisumi, nun
satelite magias.
Popolo pias.**

**Invado
sur batalkampo.**

**Kaduka soldataro.
Bruletas krucolampo.
Surda homrampo.**

**Milito
min sathororas.
Sen indulgo longtempe.
Malamo tre doloras .
Ĉies dom' ploras.**

**Preĝoj por
malnova ponto,
tuj malamon forigas .
Depresio pro honto
je via konto!**

Felix Romuliana

**Palaco
fama restadej'
Felix Romuliana.
Sur la Magura tombej'
homoj -Dioj, ej'.**

**Apotez'
jes, unu el mil'.
En ĥrista antaŭvesper`.
La lasta pagana il',
por panjo kaj fil' .**

**Fontano,
blankaj kolonoj,
skribaĵ' sur arhivolto.
Jes, por ontaj rekonaj.
Eĥadas sonoj.**

**Belegas
tiu labirint' .
Vidinda heredaĵo,
atingita dia pint',
de unu mortint'.**

**Hodiaŭ
popola rito
de antikva Palaco.
Jen, turista profito,
pro panjomito.**

* En pasinta majo zajeĉaranoj festis 50-jariĝon ekde la unua trovita eltrovejo troviĝanta sur altaĵoj en Gamzigrad banloko (11km malproksime de la urbo Zajeĉar, situanta en la orienta parto de Serbio, en Timoka kaj Negotina regionoj).

Danke al tiama arkeologo Dragoslav Srejoviĉ ekis grandaj arkeologaj laboroj kiuj donis multajn valorajn eltrovaĵojn kaj la plej granda kaj valora estis Palaco de romia imperiestro Gajo Maksimiliano en la komenco de nova erao (la 2a kaj 3a jarcento). Hodiaŭ ĝi estas unu el multaj komunaj eŭropaj heredaĵoj.

Mandio

Majaj koloroj

En majo
floroj en prosper’
disfloras ĉie sur mont’
kun aromo en aer’
ŝvebanta sur ter’.

Ruĝkolor’
sur la verda fon’
farbas arbojn helbrile
punktas sur freŝa gazon’
jen fajra sezon’.

Flav-ruband’
sterniĝas glime
ĝis la supro de l’ monto
nuance malproksime
vere senlime.

Kiel gaz’
blanka la kolor’
strias kruce libere
muare en suna glori’
per bela dekor’.

**Purpuraj
pecoj en malhel'
kuŝas en herbaj tufoj
des pli elstare kun bel'
flagre en ventpel'.**

**Kia mond'
flora en somer'!
Naturo al homaro
prezentas ĝin per mister'
kun tuta ofer'.**

Niuniu

Sento en vintro

**mia sent'
glacie frida
miksiĝas kun ĉagreno
tikla emo senbrida
varmo-avida**

**la pluvo
malsekigas min
de kapo ĝis piedoj
jame sen ajna sangvin'
nur kun kor-ruin'**

tremetas

eĉ mia koro
en furioza vento
pro malvarma rigoro
pro vipa roro

dumnokte
malvarma fluo
penetras en medolon
kaj mordetas sen bruo
ĝis nokt-malfruo

rompiĝas
mia pensfadeno
en ĉi frosta vetero
revoj mortas en sveno
cerb' en malpleno

Vejdo

Vojaĝo al Tajvano

1. Al longe sopirata loko
trans la mar'
mi suriris jam
la teron nekonatan
sed intiman kun viv-gam'
sen ajna malam'

l' insulo

kun bela pejzaĝ'
riĉas kaj fruktodonas
invitas al la vojaĝ'
al sia miraĝ'

finfine
jen plenumis mi
la sopiron delongan
kune kun la famili'
por vizit' al ĝi

2. Yehliu geologia parko

ĉemare
groteskaj ŝtonoj
allogas punktas dise
kun laŭtaj ondaj sonoj
—naturaj donoj

turistoj
kriadas kun mir'
vete fotiĝas kune
pro marpejzaĝa altir'
aŭ gapa admir'

spektaklon
kreas la natur'
homoj ĝuas kaj spektas
ĝoje kun granda plezur'

des pli kun kor-pur’

3. Malnova rezidejo de Ĝjang Kaj-ŝek

**la gravul’
jam forlasis for
nur dom’ ankoraŭ restas
oni pri lia labor’
kalkulas en kor’**

**loĝejo
okcident-stila
sidas en bela medi’
kun kvieto trankvila
sunlumo brila**

**la bosko
plenas en ĝarden’
je mirigaj sekretoj
delikata pensfaden’
skrupulo kaj ĝen’**

4. Moderna templo

**jen staras
domeg’ impona
la trideksep-etaĝa
kun tegmentpinto krona
tintil’ belsona**

**la templo
tute malsame
kiel tiuj antikvaj
ŝanĝiĝis multe jame
ja monde fame**

**ne flirtas
fumo incensa
pro media protekto
nur vizitfluo densa
preĝado mensa**

5. Lun-suna lago

**ja vasta
spac' de akvaro
glimas per rulaj ondoj
sub ĉiela blu-klaro
—natura raro**

**nutritas
ŝi per la lumo
suna kaj luna vere
vivanta en brakumo
de nebul-fumo**

**navedas
jaktaj leĝere
glitante sur arĝento**

**kun turistoj fiere
ĝoje libere**

**ravite
huraas ĥore
turistoj jen plenĝorĝe
foj-refoje fervore
tre bonhumore**

6. Monto Ali

**prosperas
la verda mondo
la ĉielon dividas
arboj per tranĉa tondo
sur alta monto**

**sporade
penetras lumo
tra foliaro densa
vibranta kiel plumo
kun venta zumo**

**enspiras
homoj profunde
oksigenon puregan
tra la nazo abunde
rundo-post-runde**

7. Sud-pinto de la insulo

**senĉese
blovadas vento
ŝancelante turistojn
plorante kun lamento
sufoka sento**

**leviĝas
ondoj en maro
siblas herboj ĉeborde
arboj kurbas kun knaro
preskaŭ sen staro**

**sin sentas
oni komforte
sub pelado de vento
sed volvas vestojn forte
stumblas laŭsorte**

8. Kanjono Taroko

**langvore
fluas la river'
inter montoj apikaj
saltas trans rok-barier'
fole kun liber'**

**surkape
pendas danĝeraj**

**minacantaj rokmuroj
kun ŝtonglitoj misteraj
kaj faloj teraj**

**turistoj
ĉiu kun helmet'
kontraŭ ebla akcident'
iras per singarda tret'
kun kor-malkviet'**

9. Pluvo en Tajpei

**tre ofte
pluvas senĉese
piedantoj kunportas
ombrelon ja necese
—tre interese**

**sed tie
la pluv' ne ĝenas
se vi sub dom-arkado
aĉetas kaj promenas
ĉar arkoj ĉenas**

**la pluvon
ĝuas kun plezur'
oni nepoluitan
en pluvo-evita kur'
kun paŝa murmur'**

Malforta homaro

**ruinon
postlasis tertrem'
homoj ja senrimedas
pentas kaj ploras kun ĝem'
vere en dilem'**

**kaoson
kaŭzas la cunam'
domoj falas krepite
ĉion regas malord' jam
sen ajna balzam'**

**inundo
voras avide
de la senhelpaj homoj
ĉion tre altrapide
vere senbride**

**neĝego
pezas subpreme
detruas varm-rimedojn
homoj dentgrincas treme
de frost' ekstreme**

**sunardo
mortigas bake**

**gren-plantaĵojn en kampoj
homoj veas lang-klake
malplen-stomake**

**la homar’
kontaŭ la natur’
ja malfortas kapkline
katastrofoj de tortur’
vipas kun terur’**

Senlima patrin-amo

omaĝe al la Virina Tago 2013

**patrin-am’
vastas kiel mar’
grandanima al ĉiuj
honesta kun blua klar’
dona sen avar’**

**patrin-am’
kun sorĉa forto
flegas idojn zorgeme
silentema sen vorto
de viv’ ĝis morto**

**patrin-am’ —
bona kuraco
jen por vunditaj koroj
disde ĝena minaco**

igas sen laco

**patrin-am’
vokas per altir’
murmure kaj intime
la gefilojn en sopir’
por rehejmenir’**

**patrin-am’ —
eternas la tem’
por poetoj, verkistoj
— por menso la nutra krem’
la bela poem’**

Brave, Jadranka!

**Jadranka,
vi faris prave
l’ unuan ĉineskaĵon
metrike kaj enhave
verkitan, brave!**

**Vi amas
arde kun sincer’
la patrujon elkore.
Ŝiaj kulturo kaj ter’
jen via esper’.**

Ha, plue

**verku, Jadranka,
pri sentoj, travivaĵoj
per ĉinesko multflanka
por spert' nemanka.**

*Jadranka Miric (Serbio) verkis kvin strofojn per ĉinesko Sopir-al-sudo. Tio estas la unua provo por ŝi verki ĉineske. Mi verkis ĉi tiujn strofojn por kuraĝigi ŝin.

Vizito al antikva urbeto

**Por ni tri
estas plezura
la vizit' al l' urbeto.
Igas pejzaĝo rura
la koron pura.**

**Fluetas
tre klara rojo
ronde ĉirkaŭ l' urbeto.
Paŝas sur kota vojo
homoj kun ĝojo.**

**En bazar'
navedas homflu'.
Libere el kamplabor'
Homoj sin distras kun ĝu'
kun babila bru'.**

Ŝtonponto
Staras impone.
Ĝi vidas travivaĵojn
pasintajn nepardone
kaj atest-done.

Muelil'
laboras pene
jen por mil familioj,
spite modernon plene
zumas senĝene.

Kabanoj
el lign' fortika
spertas cent-jaran provon
de ŝtormo pereiga,
tondro panika.

Kampuloj
simplaj en paco
kamlaboras kaj vivas
de natura donaco
sen ajna laco.

Volontas
ni ne foriri
de la aminda tero
jen kun emo sopiri,

bedaŭr' suspiri.

Yanke

Feliĉo de sablero

mi brilas
ne samkiel or'
sed feliĉon mi ĝuas
se mi vivas en sunglor'
sur plaĝa marmor'

mi serĉas
tie kaj tie
mian propran konkdomon
por vivi familie
dormi ebrie

ĉe l' maro
ludas en sunlum'
mi en varma sabla rond'
sub muzik' de homa zum'
kun marventa rum'

mi volas
de ina sabler'
peti l' manon elkore
kun mia tuta sincer'
plena je esper'

**mi hatas
esti kun cement'
miksita fari murojn
de homa apartement'
kontraŭ mava vent'**

**liberon
mi tre aspiras
sur plaĝo, ĉe la maro
kunvivadon sopiras
komforte spiras**

Zhuang Qixiong

Shengzhou-9

**Kosmoŝip'
flugas en spaco.
Ĉiuj kore hurais
pro diina donaco.
Al via paco!**

Yongyuyue (Ĉiama Ĝojo de Renkontiĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 12 versoj de
444,445,446,346/ 446,445,446,344 silaboj, laŭ
rimaranĝo xxa, xxa, xxa, xxa (x=senrima)

Guozhu

Centjara Jubileo de Verda Majo

**La sepa de/ marto estas/ dat-reveno
de centjara/ Verda Majo./ Al la kunveno
jubilea/ ni venas kun/ kar-memora beno.
Post himno/ / jubilas refreno**

**de rondelo./ Prelego pri/ historia sceno
per lumbildoj./ Esperanta/ kuko. Soleno.
En salono/ okulfrape/ ruĝas ciklameno
omaĝe/ al feina/ brava veno!**

2012-03-07

Yujia'ao (Fiŝista Fiero)

ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj kun po 5 versoj de 7,7,7,3,7 silaboj kun kontinua rimo

Guozhu

Lojala danco

**Danco sub nom' Lojala
rito oficiala
en tempo anormala,
batala,
fanatike morala.**

**Mov' laŭ takto cimbala,
paŝ' laŭ ritmo timbala,
en etoso fatala.
Skandala
rekordo speciala.**

2012-01-06

Yulinling (Tintado en Pluvo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj
respektive de 4,44,644,65,347 / 7,35,634,426,345 silaboj,
laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa,xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x =
senrima)

Viktoro

En grava malsano

**sen energi'
mi min trovas
en fantazi'
sencie komata
jam filmbildoj
ja kun seri'
fulmas en la menso
en mia vizi'
mi vidas
mavan morton
aliras min kun rabi'**

**jam en lasta agoni'
rezistas
mi kun subkonsci'
mi falas abismen
plongante
kun laŭta kri'**

**en peza ŝvit'
plene
cele al fin-staci'
vespire
al fatalo
cedas nure mi**

Yumeiren (Belulino Yu)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5; 7,9; silaboj kun para rimo.

Vejdo

Sopire al la maro

je la naskiĝtago de Anniespera (2012)

**sopiras, ho, vi kara
al vasto mara
kiel fiŝo libera
naĝas pace per mov' leĝera**

**tie lazuras fluoj
sen ŝrikaj bruoj
nure bela pejzaĝo
glimas en mirinda miraĝo**

tie multas trezoroj

**de alt-valoroj
en akv-draka palaco
utilaj al saĝ' kaj sagaco**

**tie ondas pasio
de energio
akvestaĵoj konkure
sin pafas sob aŭ sor plezure**

**jen la maro de scio
kun verda prio
allogas Esperanto
vin al lernesplora konstanto**

**jen kial vi sopiras
kaj vi aspiras
al blua mar' profunda
al la akvosfero fekunda**

Zhuzhici (Bambuoj)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de sep silaboj laŭ
rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

Vejdo

Al amiko en for’

kara amiko en for’,
ĉu vi fartas en ĉi hor’
bone sen mia kuno,
sen patrolanda favor’?

kara amiko en for’,
ĉu vin turmentas dolor’
de sopir’ al patrio,
kie pompas ruĝ-aŭror’?

kara amiko en for’,
ĉu ankoraŭ kun fervor’
vi kaj lernas kaj studas
en la scienca esplor’?

kara amiko en for’,
ĉu vi dronas en labor’
fororgesante ripozon
nur por homara trezor’?

**kara amiko en for',
vin mi tenas en la kor'.
ĉu vi scias, vi ĉiam
hantas en mia memor'?**

